

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

NIAJ PLANOJ

sept. 3: Prezento de spertoj (ĉe nia Muzeo)

Ni revivigos nian tradician agadon neokazintan en la pandemia periodo, unuafoje prenante lokon en nia Esperanto-Muzeo Jokohama (la Muzeo). En ĝi, nia membro prezentos sian sperton en tiu ĉi jaro — ne nur somero — en Esperanto, de 5 ĝis maksimume 30 minutoj, kun aŭ sen bildoj el komputila ekrano.

sept. 25: Vizito al nia Muzeo, de ekskursanoj post la Japana Kongreso

De la 23a ĝis la 25a de septembro okazos la 109a Japana Esperanto-Kongreso en Urbo Hachioji [haĉiooĝi], unu horon trajne de Tokio aŭ de ni Jokohamo. Post la kongreso, en la 25a okazos 3 ekskursoj. (1) 1-taga al loka monteto, (2) 3-taga al Esperanto-Domo de Jacugatake, kaj (3) 2-taga, tra nia muzeo al Tokio. Tiu tria plano trafos nin. Post la fermo de la Kongreso, je 15:15, 10 ĝis 15 personoj per buso vizitos nin, kaj restos iom malpli ol unu horo ĉe ni. La ekskursanoj, post klarigo pri la Muzeo, libere pasigos tempon rigardante nian kolekton.

Niaj klasoj

***Eseoj:** gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabata posttagmezo. Lastatempe oni finlegis esearon “Tamen ĝi moviĝas”, precipe ties ĉapitron pri Esperanta Kinoarto. Nun oni legas raportaĵon de Hemmi Yō “Homoj Manĝantaj”.

***Jokohama Salono:** sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele. La 2-an sabaton oni interkritikas liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas tradukaĵon el materialo libere elektita.

***erikoj:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Lastatempe oni legas japanan novelon “La Pordego” de Nacume Sooseki, tradukitan de Doi Ĉieko.

***Verse:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, neregule, unu lernanto. Lastatempe oni eklegis “Viktimoj” de Julio Baghy.

***Teksanto:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo. Nun legata estas “Falantaj Muroj” de Trevor Steele.

kondolenco el nia amiko Anatolij Ionesov en Uzbekio

Karaj japanaj geamikoj,

Spektinte TV-novaĵraportojn pri la pafatako en Nara, kie estis mortpafita eksa ĉefministro de Japanio Shinzo Abe, ni esprimas al vi kaj al viaj samlandanoj niajn profundajn kondolencojn kaj kunsentojn.

Pensante pri vi kaj via popolo...

Estu sanaj kaj sekuraj!

Pacamike,
Anatolij & familio

La 124-a Legokunsido

En la 3a de junio 2022 ni havis la 124-an legokunsidon por **mem elektitaj verkoj**. Partoprenis 4 personoj.

“Hetajro Dancas” de Eli Urbanová

Mizro Iwaya

Kiam mi legis la libron “Sekretaj Sonetoj” antaŭ dekoj da jaroj, mi kredis ke ĝi ne povas manki en esperanta literaturo. Same kiam mi legis tiun ĉi libron, mi sentis ke ĝi estas niĉa sed grava verko en Esperanto. Nome ĝi montras la tutan vivon de esperanta poetino, kiu vivis libere inter viroj. Kutime tia “privateco” ne aperas libroforme, sed se temas pri ŝia libro, mi povas diri ke ŝi sukcesis altigi la nivelon al literatura verko.

En la libro aperas multaj nomoj, kiuj koncernas ĉefe Ĉeĥan Esperanto-Movadon. Tio estas unu kaŭzo kiu malfaciligas al ni kapti la enhavon, ĉar ni ne havas sufiĉe da scikono pri ĝi. Supozeble la aperintoj estas ŝiaj antaŭuloj de Esperanto. Ŝi ofte skribis tre delikatan privatecon pri ili. Tia “honesto” konfeso tiras nian atenton.

Antaŭ ĉio, kial ŝi estas “hetajro”? Supozeble ĉar ŝi vivis en **ko-ekzisto** kun tri viroj en sia vivo. Ili estas Ŝtefo, Jan kaj Ernesto. Ili estis reale vivantaj personoj. Ili respektive havis akran personecon. (Mi vidas similajn ekzemplojn ankaŭ en Japanio, ke iuj virinoj amas ĉiam problemozajn virojn.) Ŝiakaze preskaŭ ĉiu el ili mortis post nelonge, kaj ŝi restis kvazaŭ forlasita hetajro. Ŝi ofte prikantis ilin. Unu el la kantoj estas titolita ĝuste “Hetajro dancas”. Ĝi kantis amon al la mortinta amato jene.

Kiel en kristal’ ĵus ŝirita floro
pompas vi, amant’, en la kadra oro,
ŝvebas florpharum’ tra l’ izolsilento:
Dolĉa amtento.

.....

Supozeble ĉi tie “vi” estas la dua amato Jan, hinda guruo. Ŝi konatiĝis kun li kiam ŝi estis

ankoraŭ edzino de la unua Ŝtefo, kiu estas iusence fama en Esperantujo, ĉar ankaŭ li verkis iom en Esperanto. Jan donis kaŭzon al ilia divorco. Post la divorco la aŭtorino komencis vivi kun la nova amato, sed tio ne daŭris longe. Post lia morto ŝi renkontiĝis kun Ernesto en la tombejo de la antaŭa amato! Tiamaniere daŭras ŝia amaventuro.

Mi memoras similan esearon de japana verkistino Hayasi Mariko. Ŝia unua esearo “Ni vigle reiru hejmen (ルンルンを買って おうちに帰ろう)” estis unika libro kie la aŭtoro konfesas multe pri sia aminklino. En la antaŭparolo ŝi diris: “Junulinoj ofte havas krudan rilaton kun viroj, sed ili ne diras vere honestan konfeson antaŭ manuskriptoj. Mi volas disrompi tian bedaŭrindan tendencon.” Kaj ŝia “honesto konfeso” akceptiĝis entuziasme en la japana merkato kaj ŝia verko vendiĝis tre bone. Tiu sukceso kondukis ŝin al aŭtoritateco en japana literatura skolo, fine eĉ al ĉefdirektoro de universitato.

Se temas pri Eli Urbanová, ŝi jam havis aŭtoritatecon kiam ŝi eldonis ĉi tiun libron en la aĝo de ĉ. 70 jaroj. Ŝi ne estis junulino sed la eldono vekis sensacion en tiama Esperantujo, ĉar multaj esperantistoj aperis tie kun siaj veraj nomoj. Iu (ekz. Ed Borsboom) diris, “Mi estis bonŝanca ĉar mi ne kondukis krude kun ŝi. (Tial mia nomo ne aperis en la libro.)”

La enhavo estas ja interesa. Sed mi ne povis bone kompreni pri kelkaj partoj en ĝi. Ĉeĥa Esperanto-Movado ne estas familiara al mi. Dume mi estas certa ke ĉiu povas trovi ian intereson en ĝi, ĉar simila libro vekis vastan intereson en Japanio.




Interesas intermilitaj spertoj: “Aventuroj de Pioniro” de Edmond Privat

Sibayama Zyun’iti

Edmond Privat (1889-1962), sviso, verkis tiun ĉi aŭtobiografian verkon – fakte ĝi estas rezulto de lia plurfojaj prelegoj post la dua mondomilito. En ĝi, la ĉefaj “aventuroj” laŭ li estas pri la tempo iom antaŭ la unua mondomilito ĝis la dua.

Li estas fama kiel la aŭtoro de legolibro “Karlo”, kaj kiam mi verkis komenton pri tiu libro (eldonita de Mevo-Libro), mi serĉis en tiu ĉi verko, kian edziĝon li faris, ĉar “Karlo” en la verko faris feliĉan edziĝon. Sed vane; la foto de lia edzino aperas, sed la libro ne priskribas lian edziĝon aŭ familian vivon.

La unua “aventuro”, por junulo 18-jara, okazis en Usono. Post la vaŝingtona UK en 1910, li restis en Usono, verkis anglalingvan lernolibron de Esperanto ĉe eldonisto, kiu rekomendis, ke Privat prefere restu en Usono kiel negocisto, dirante ke li fariĝos riĉulo tie. Sed fordankante li revenis Eŭropon.



Al mi la plej impresa epizodo estas pri la slovak (tiam hungara) urbo Košice, ĉar mi du fojojn vizitis la urbon, kie loĝas la korespondamikino de mia edzino. Temas pri vintro en 1915, kaj Priat, svisa ĵurnalisto, ne estis permesita pli eniri en la landon (de la hungara flanko), kaj tamen estis permesita resti unu nokton en tiu urbo nekonata al li. Li petis kondukiston de glitveturilo – hodiaŭ devas esti taksio – viziti UEA-delegiton en la urbo, kaj li estis varme akceptita de la delegito.

Interesa al mi de la nuntempo estas la ĉapitro pri Lvovo – poldevena nomo, kaj nun kutime oni nomas la urbon Lvivo (Lviv), urbo en la okcidenta parto de nuna Ukrainio, proksima al Pollando. Kaj la urbo nun aperas en novaĵoj kiel unu el la atakceloj de rusa armeo al Ukrainio. Privat priskribas jene: “En Lvovo mi konstatis en tiu printempo de 1915, ke la okupanta rusa armeo ĝenerale respektis la polojn, sed ne la ukrainanojn.” Tiu urbo longe estis teritorio de Aŭstra Imperio, kaj en la milito, Rusa cara militistaro okupis ĝin: temas pri tiu tempo. La historio diras, ke la urbo estis poste re-Aŭstriigita, kaj en 1919, Okcidenta Ukrainio sendependiĝis.

Eseo

Pejzaĝo Sen Kabloj

AKIYA Hideo

Lastatempe mi akiris unu aplikadon nomatan “TouchRetouch” por retuŝi foton. Ĝi estas malmultekosta kaj specialigita nur al la funkcio elimini el la bildo figuron kaj obstaklon, kiujn oni fotis necelinte, nevolinte. Ŝajnas ke tiu funkcio estis realigita ankaŭ en aliaj pli multekostaj, multifunkciaj retuŝoaplikaĵoj, sed onidire ĉi tiu estas ja pioniro de tiu funkcio.

Per la aplikado mi volis fari iun provon. Kiam mi fotas pejzaĝon ie, ofte en la foton envenas malbonvenigaj elektraj kabloj kaj fostoĵoj. Ili estas precipe rimarkeblaj en urba areo. Mi deziras prove elimini ilin. Tamen mi ne intencas fabriki aparte belaspektan bildon. Mi demandis min,

kia estus la pejzaĝo, se ili ne troviĝus tie? Ĉu ĝi aspektus pli bone ol nun?

Iam antaŭ longe, kiam mi proksimiĝis al la najbara stacidomo, kiu estas la fino de mia kutima promenejo, mi rimarkis, ke multaj kabloj iras trans la ĉielo. Kompreneble, tio ne estas mia unua trovo, ĉar certe mi vidadis tiun pejzaĝon longatempe ĝis tiam.

Sed, ial mi havis senton de bedaŭro, ke la kabloj baris al mi rektan vidon de la granda ĉielo. Kaj antaŭe, tiu ĉielo estas apenaŭ videbla tra la aperturo mallarĝigita de konstruaĵoj ĉe ambaŭ flankoj de la strato. Pluraj kabloj distranĉis tiun malgrandan ĉielon en partojn. Ekde tiam la

kabloj ĉiam estas malagrablaj al mi. Eĉ se en serena vetero ili ĝenas min ĝui belan vidon de la sceno sub la granda ĉielo. Estas tre bedaŭrinde. Ankaŭ bedaŭrinde estas, ke la fostoj, kiuj streĉas la kablojn, staras en la trotuaro laŭ ĝia rando.

Kvankam la vojo ne estas sufiĉe larĝa por homoj preterpasi unu la alian, la fostoj okupas neignoreblajn spacojn kaj reduktas ties larĝon senkonsidere al la embaraso de piedirantoj. Tio ofte devigas min elrandiĝi en ŝoseon por eviti kolizii kontraŭ la preterpasanto, ĉar mi volas marŝi plejeble senhalte. Tiam mi kutime diras al mi, "Se ne estus tiuj fostoj!"

Kompreneble, eĉ antaŭ dek, dudek jaroj aŭ pli elektraj kaj telefonaj kabloj estis streĉitaj ĉie. Kaj ties fostoj troviĝis flanke de ĉiu vojo. Sed tiutempe ili ne tiom ĉagrenis min. Nuna densiĝo de tiom da kabloj rezultis de la rapida kresko de la telekomunikada industrio. Ofte mi renkontas laborejon de konstruado instalita kaj etendi kablojn. Al mi ŝajnas, ke la laboro okazas

sporade, ne intensive. Ĉu la konstruado estas bone planita kaj aranĝita?

En centra parto de urbo oni planas subterigon de la kabloj, ĉar kiam katastrofa tertremo okazas, eblas ke falintaj fostoj kaj streĉitaj aŭ detranĉitaj kabloj malhelpos urĝan agadon por savi damaĝitojn. Verŝajne la projekto progresas iom post iom. Sed en la suburba areo de Yokohama, kie mi loĝas, mi trovis nenian laboron de la subterigo ĝis nun. Do, mi dubas, ĉu oni planas iajn projektojn por suburba zono?

Mi deziras, ke la subterigo-projekto progresos ankaŭ en suburbo kiel eble plej frutempe, ne nur por preventi pliigi damaĝon de katastrofo, sed ankaŭ por regajni pli bonan aspekton kun senkabla, libera ĉielo, kaj pli larĝan trotuaron.

Mi provis elimini kablojn kaj fostojn el fotoj de mia najbaraĵo per la aplikaĵo. Jen sube mi montras kelkajn ekzemplojn. Ĉu ili estas sukcesaj? Mi estas pli-malpli kontenta.

Strato al la stacidomo (antaŭ retuŝo)



(post retuŝo)



Apud mia dombloko (antaŭ retuŝo)



(post retuŝo)

